

# esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ☆ 5/2001  
Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ☆ Oktobro 2001

## Look inside for:

President's message	2
Postkongresa raporto	3
Antaŭkongresa invito	4
From the CO	4
Esperanto on-line	5
New from the Book Service	6
Esperanto in the media	6
Recenzoj	
<i>Avangarde</i>	7

*plus*

## LITERATURA SUPLEMENTO

UNESCO's work in Education, Communications and Culture retains a strong emphasis on the importance of multilingualism and of the protection of linguistic diversity in a globalizing world. Nevertheless, we recognize that such diversity must never be used as a pretext for violence or conflict. This is our challenge. It is one which we share with our partners throughout the world, such as yourselves, who are committed to the goals of the Dialogue between Civilizations. (from the *Message of the Assistant Director-General for Education to the 86<sup>th</sup> World Esperanto Convention, July 2001, Zagreb*)

## THROUGH THE EYES OF A NEWBIE

Richard KINNE

I spent three years in High School learning French. It was, easily, my worst subject in school. My High School had a choice between French and Spanish. The Spanish teacher and I had a "history," so I chose French. At that point in my life, in 1979, I was visiting Canada about once a year. I thought I'd be able to use my French there. Of course, I've managed to visit Canada twice in the 20 years since I've left High School.

I left High School thinking I had no talent for languages, and perhaps I was right. However, I maintained a certain jealousy for people who could speak another language. About 5 years ago I became involved in a Star Trek club in Ithaca, NY. Our captain was a recent Cornell linguist graduate who stayed on in Ithaca to create a computer business. One day a French exchange student walked into one of our meetings. The kid spoke very good English, but our Captain, without blinking an eye, spoke to him in French. The kid was thrilled and we gained a member on the spot. It certainly wasn't that the kid couldn't speak English (because certainly no one else in the club besides the Captain spoke French!) but that this was probably the first time in a long time he could speak to someone in his native language. I never forgot the sight of Captain Anbinder switching between French and English as easily as he turned his head. I wished I could do that.

About nine months ago, just after I started Grad School, I discovered Esperanto. I don't quite remember how, but these days it was probably on the Web. I remember thinking, "If I can't learn THIS language I won't be able to learn any of them." And so, starting out with *Teach Yourself Esperanto* and simultaneously going through *Esperanto: Learning and Using the International Language* I started my journey. Soon I'd signed up with Ken

Caviness (thanks, Ken!) on the Internet for the 10-lesson Internet course.

Due to graduate school, I'm still at my Esperanto studies, probably making slower progress than any Esperantist in history. However, after nine months, several chapters, and 8 lessons with Ken I'm at the point where I can read the Esperanto articles in *Esperanto USA* with only a bit of difficulty and the occasional dictionary, something that I'd not been able to do after three years of French.

I am driving my friends crazy by speaking to them in Esperanto and it's gotten to the point where I fancy my cats can even understand me speaking to them in the language (the two of them are the largest targets of my pronunciation practicing).

However, the beginning of October sees my first big test. Several months ago I made preliminary plans to attend la 8a Internacia Esperantista Semajnfino in Vermont. A couple of months ago I decided NOT to go because I didn't think I was ready. I'm still having a lot of difficulty hearing, and I still tend to stutter when I speak Esperanto. But, several of my linguist friends convinced me that the best thing I could do was immerse myself in that type of environment. Then, over e-mail I met Tomas Alexander, a new member of ELNA's Board of Directors. "Nepre iru al Okemo," he said.

And so, October 5<sup>th</sup> will see me at my first Esperantist Conference. Frankly, I'm scared to death, thinking that I'll understand about 10% of what is said all weekend, and make a fool of myself every time I open my mouth. But, Tomaso and his friends have convinced me that they'll be understanding and patient and so will everyone else.

With that I jump into the deep end of the pool. What will this Nova Esperantisto find? Stay tuned for further reports i-n future issues of this newsletter.

Esperanto League for North America  
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530  
USA/USONO

☎ 510/653-0998; 📠 510/653-1468  
✉ elna@esperanto-usa.org  
www.esperanto-usa.org

*President/Prezidanto:* David T Wolff  
*Vice President/Vicprezidanto:* Grant Goodall  
*Secretary/Sekretario:* Ellen M Eddy  
*Other Board Members/Aliaj estraranoj:* Thomas Alexander, Jennifer Bondelid, Peggy Dolter, D Gary Grady, Angela Harlow, Ralph Lewin, Elizabeth Raible, Orlando E Raola, Derek Roff

*Director, Central Office/Direktoro de la Centra Oficejo:* Joel Brozovsky  
*Vice Director, Central Office/Vicdirektoro de la Centra Oficejo:* Ionel Oneț

### esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America  
Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko  
Vol. 37, No. 5  
ISSN 1056-0297

*Editor/Redaktoro:* Ionel Oneț  
☎ 510/653-0998; 📠 510/653-1468  
✉ ionel@esperanto-usa.org

Materials for *esperanto USA* should be sent to/Materialojn por *esperanto USA* oni sendu al:

*esperanto USA*  
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530  
USA/ USONO  
or by e-mail/aŭ e-poŝte al:  
e-usa@esperanto-usa.org

The opinions expressed in this bulletin are those of the authors, and don't necessarily represent the point of view of ELNA or its bulletin/La opinioj esprim-itaj en ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is permitted, provided that due credit is given, and a copy of the reprinted material is sent to ELNA/Estas permesate reaperigi materialojn el ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj ke oni sendu ekzempleron de la republikiĝita materialo al ELNA.

Deadline for the next issue/Limdato por la sekva numero: 29.11.2001.

*Sez the Prez*

To friends of liberty and justice everywhere, greetings.

We at the Esperanto League for North America have received many messages of condolence, support, solidarity, and friendship from Esperanto organizations and individual Esperantists during the last weeks. These messages came from Australia, Austria, Belgium, Bosnia-Herzegovina, Bulgaria, the Chuvash Republic, Iran, Italy, Japan, Yugoslavia, Colombia, Korea, Mexico, Pakistan, Paris, Peru, Poland, Romania, Russia, Togoland, the UEA and the UEA at UNESCO.

As President of ELNA, I want to express our appreciation and thanks for these messages. As an Esperantist, I believe that American Esperantists everywhere thank you. As an American, I believe that Americans everywhere thank you.

The United States was not alone in its losses on September 11. Citizens of many nations were murdered. 200-300 people

from Britain are lost or dead – according to one report, the worst loss ever to terrorists for that country. Chile lost some 250 people, Columbia 200, Turkey 130, the Philippines 115, Israel 110, Germany 100-170, at least dozens from Australia, Austria, Bangladesh, Brazil, Canada, the Czech Republic, Ecuador, El Salvador, Ireland, Japan, Pakistan, Russia, India; at least a few from 30 other countries. On that heart-touching day, I was in Bermuda. Even that tiny island lost at least one daughter. Truly, we are all one world.

I send to all of you the condolences, the support, the solidarity, and the friendship of American Esperantists and Americans.

From our hearts, thank you.

David WOLFF, President  
dwolff@world.std.com  
978/264-0286 (8-10pm Eastern time weekdays, noon-5pm weekends)

## FIVE MOST WANTED

by the Esperanto League

**These volunteer tasks are on the lam. The League needs your help in apprehending them!**

**Task: Corporate style guide. Find or write professional guidelines for a unified appearance for all ELNA publications.**

**Priority: 1. Time: 1-2 hours per week. One-time (English).**

**Task: Resources Committee head. Do fundraising inside and outside of ELNA, find other resources.**

**Priority: 1. Time: 1-2 hours per week. Permanent (English).**

**Task: Talent Bank/Volunteers Committee. Match volunteers and projects through the Talent Bank.**

**Priority: 1. Time: 1-2 hours per week. Permanent (English).**

**Task: Coordinator of committee reports. Collect and redistribute quarterly committee reports.**

**Priority: 2. Time: 1-2 hours per month. Permanent (English).**

**Task: Constant Amusement Committee/Agent (KAKA). Make certain that the Movement is amusing and fun. May include running around naked. (This post can be anonymous.)**

**Priority: 2. Time: 1-2 hours per month. Permanent (Bilingual).**

**APPREHENDED: None in the last month. Check our website for more tasks that need a careful watch!**

**You do not need to be an expert – but you do need enthusiasm! To help, contact David Wolff at: ✉ dwolff@world.std.com, ☎ 978/264-0286, or 6 Durkee Rd, Acton MA 01720.**

# VI VOJAĜIS KIEN?

Henry STUDER

“Vi intencas vojaĝi kien?” estis la kutima reago de amikoj aŭdinte mian planon aliĝi grupon de esperantistoj por viziti Albanion post la 86a UK en Zagreb. Jes, ja, Albanio ne estas kutima cellando de turistoj. Sed mi jam dum multaj jaroj estis scivolema pri tiu lando, kiu travivis longan tempon fermita al la ekstera mondo. Do, kiam Lusi Harmon anoncis postkongresan vojaĝon al Albanio pere de Esperanto-Vojaĝservo, mi kaptis la okazon kaj aliĝis.

En nia grupo estis du japanoj, du koreoj, unu finno, du germanoj, unu israelano kaj kvar usonanoj – entute 12 aventuremuloj. Nia gvidanto kaj tradukisto estis albana esperantisto, Bardhyl Selimi Mezini. Li loĝas en Tirana, la ĉefurbo de Albanio, kaj li faris la vojaĝplanon kun helpo de Adem Ymeraj, la estro de Tirana Tours and Travel Agency.

Eniro en Albanion estas iomete komplikika. Mankas flugoj rekte de Kroatio al Albanio. Pro tio ni unue iris aŭtobuse de Zagreb al Slovenio. Post du tagoj en tiu belega lando, ĉe Lago Bled\*, ni iris al la flughaveno de Ljubljana, trafis aviadilon de Adria Airways, kaj post iom pli ol unu horo alvenis en Tirana. Bardhyl kaj Adem bonvenigis nin tie, akompanis nin dum la sekvantaj sep tagoj kaj glatigis por ni la vojon (sed ne la stratojn!).

Ni veturis ĉiun tagon per nia propra aŭtobuso kiu havis klimatizilon. Dum nia restado en Albanio la vetero estis varmega kun alta humideco, kiel en multaj aliaj eŭropaj landoj tiutempe. Do, la klimatizilo estis por ni bonŝanco. Ŝajnas ke la albanoj plejparte alkutimiĝas al manko de klimatizado. Kro-

me, la senpluveco kiu regas la landon lastatempe malplenigis la rezervujojn. Pro tio mankas sufiĉe da elektro. Ofte videblas elektro-generatoro sur la trotuaro, antaŭ butikoj aŭ malgranda entrepreno, por funkciigi ion nepre bezonatan kiel komputilon. Plejparte mankis trafiklumoj pro manko de elektro, kaj la trafiko ŝajnis ĥaosa. Tamen mi ne rimarkis eĉ unu akcidenton survoje dum nia longa vojaĝo. Multe helpis la hupo pri kiu ĉiu albana kondukisto certe estas lertulo.

Ni veturis de la urbo Shkodër en la nordo ĝis Saranda en la sudo de la lando. Albanio estas plenplena je antikvaĵoj, ekzemple restaĵoj de greka, romia kaj turka civilizacioj, dum la albana lingvo mem devenas de eĉ pli frua civilizacio, verŝajne de la ilira. Pro tio ĝi malsimilas al la aliaj lingvoj kiuj troviĝas laŭ la norda mediteranea marbordo. Ni vizitis multajn kastelojn kaj fortikaĵojn, kiuj apartenis unue al unu venkinto kaj poste al aliaj sinsekve tra la jarmiloj. La bataloj kontraŭ la turkoj, kiuj invadis Albanion de la oriento komence de la jaro 1415, rolas grave en la historio de la lando. Gjergj Skanderbeg (1405-1468), albana nacia heroo de tiu tempo, ankoraŭ estas alte estimata.

En la sesdekaj jaroj la albana registaro ŝajne timis invadon de aliaj nacioj. Por defendi la landon, la registaro starigis milojn da fungoformaj fortikaĵoj, ĉiu taŭga por unu soldato kiel pafejo. Ĉi tiuj betonaj ŝirmiloj troviĝas de la nordo ĝis la sudo kaj oriente almenaŭ ĝis Berat, la plej orienta urbo de nia vojaĝo. Vicoj de ili staras superrigardante belegajn havenojn kaj insuletojn laŭ la suda dalmatia marbordo, sur la flankoj de mont-

etoj, vice trans larĝaj valoj, en olivarboj, vitejoj kaj paŝtejoj. Jen alia postsigno de civilizacio en la balkana duoninsulo!

La albanaj vojoj ofte estas malglataj, kun truoj kiuj devigis la malgrandiĝon de la aŭtobusa rapideco. De tempo al tempo necesis dividi la vojon kun grego de ŝafoj aŭ kaproj, aŭ kun ĉaro trenata de ĉevalo. Plejparte la vojoj estas mallarĝaj, sed nia ŝoforo veturigis nin tra

ĉiun malfacilaĵon, kaj ni alte taksis lian lertecon.

Ni tranoktis en tri urboj: Tirana, Saranda kaj Berat. Niaj hoteloj ne estis luksaj, tamen tute komfortaj kaj konvenaj. Mankis nur kurteno ĉirkaŭ la duŝejo en la banĉambro, sed eĉ al tio ni (preskaŭ!) alkutimiĝis. Vespermanĝo kutime okazis ĉe la hotelo, sed ni tagmanĝis en restoracioj en urboj aŭ urbetoj laŭ la vojo. La manĝaĵoj estis bonaj, kvalite kaj kvante, kaj neniuj (almenaŭ laŭ mia scio) malsaniĝis dum la tuta vojaĝo. Do, Bardhyl kaj la enlanda vojaĝservo bone elektis la restoraciojn.

Fakte, mi supozas ke ni ĉiuj atendis ian specon de malfacilaĵo dum la vojaĝo. Verŝajne ĉiu havis sian propran maltrankvilon, ĉu manko de pura akvo, ĉu perdo de mono aŭ pasporto al ŝtelistoj laŭ la stratoj, ĉu malfeliĉaj renkontiĝoj kun policanoj ktp. Sed ni maltrankviliĝis vane! Pura akvo malkare abundis botele. Ne estas multe da turistoj en Albanio, kaj pro tio eble la ŝtelistoj ankoraŭ laboras en pli fruktodonaj landoj kiel Hispanio kaj Italio (Certe mi mem trovis kelkajn tie lastatempe!), kaj la policanoj ŝajne havis aliajn pli gravajn zorgojn (kvankam ili ofte haltigis nian ŝoforon survoje kaj kontrolis liajn permesilojn!).

La vojaĝo en Albanio estis multe pli glata ol mi atendis. Tio, sendube, estas pro la laboro kaj la konstanta bonkoreco de nia gvidanto Bardhyl. Li ŝajne neniam laciĝis, nek pro la ĉiutaga traduklaboro, nek pro niaj senfinaj demandoj, nek eĉ pro niaj plendetoj. Laŭ li, ĉio eblas kaj ĉio belas. Lia fako estas instruado de matematiko en tirana lernejo. Li diris ke liaj studentoj atingas la aĝon en kiu regas la hormonoj kaj tio postulas de bona instruisto multe da pacienco. Tio en li certe abundas. Ni ege dankas al li pro liaj multaj afablaĵoj kiujn li malavare disdonis al ni. Certe mi neniam povos pensi pri Albanio sen samtempe pensi pri li.

Do, ĉu vojaĝo al Albanio estas rekomendinda? Ho, jes! Tamen antaŭ via foriro, nepre petu konsilon de Bardhyl, kaj poste ĝuu (antaŭ la alveno de la turistaj kaj ŝtelistaj hordoj).

\*Se vi hazarde troviĝos en la regiono de la nord-sloveniaj montoj, ne hezitu halti ĉe Lago Bled, kie mi pasigis du el la plej belaj tagoj de la nuna jaro. – red.

Tirana 2001



## venu festi la oran ison kaj bonvenigi la oran oson!

Nun venas la tempo fari noton sur vian kalendaron! La Jubilea Kongreso de ELNA okazos en Sacramento, Kalifornio, la 21-24an de junio, 2002. Tiam ni festos la 50an, oran, datrevenon de la naskiĝo de ELNA. Estas aparte signifiplene ke Sacramento estos la gastiganta urbo por ĉi tiu kongreso, ĉar en Sacramento mem ELNA ekvidis la taglumon. Estas bedaŭrinde ke neniu el la iniciatintoj de ELNA povos korpe ĉeesti, sed ili certe partoprenos spirite.

Ni kongresos en la Hotelo Hawthorn Suites, lokita ĉe la nordokcidenta flanko de la urbo. La hotelo situas ne for de la urbcentro kaj la historie riĉa Old Sacramento, kiu etendiĝas laŭ la Rivero Sacramento. Malantaŭ la hotelo troviĝas riverborda parko, kie komenciĝas bicikla vojeto trapasanta mejlojn da riverbordaj pejzaĝoj. La hotelo troviĝas ne for de la Internacia Flughaveno Sacramento, kaj proponas senpagan veturigon por gastoj

alvenintaj aviadile.

La LKK nun evoluigas taŭgan programon por ĉi tiu Kongreso. Kelkaj programeroj jam estas deciditaj. Ekzemple, ĉu vi scias kiel inĝenieroj dezajnas pendpontojn? Ano de ELNA, kiu estas tia inĝeniero kaj kiu laboras evoluigi dezajnon por nova pendponto en la San-Francisca golfa regiono, klarigos la dezajno-proceson por ni. Ĉu vi volas plibonigi vian parolkapablon? Ni planas serion de konversaciaj rondoj je pluraj niveloj por ke ĉiu gajnu fidon aŭskulti kaj paroli Esperanton. Ĉu ankaŭ vi aliĝu kiel gastiganto en la adreslibro de Pasporta Servo? Kiaj estas la rekompenoj? Vi havos okazon aŭdi rakontojn de gastigantoj pri iliaj plej ŝatataj gastoj (kaj eble pri iliaj gastoj el infero!). Kaj ne forgesu la apartan aŭkcion kiun ni planas!

Kompreneble okazos Interkona Vespero, Distra Vespero kaj Bankedo. Diversaj ekskursoj tra la urbo (kaj eble al

mondfamaj vitejoj kaj vinkeloj en la Napa Valo!) sekvos la Fermon de la Kongreso lundon matene. Aliĝilo kaj la unua Kongresa Bulteno baldaŭ alvenos al vi, samtempe kun la renoviga pakajo de ELNA. Tiam vi eĉ povos indiki viajn ekskurspreferojn.

Ĉu vi havas ideon pri programero kiu interesos kongresanojn? Bonvolu informi nin. Kaj, se vi mem volas prezenti programeron, ni certe bonvenigos vian proponon. Ju pli da partoprenantoj, des pli interesa, valora kaj memorinda por ĉiuj estos la Jubilea Kongreso de ELNA.\*

La pasintaj 50 jaroj estis oraj por ELNA. Ni festu tiun Ison en Sacramento, kaj strebu por ke la Oso estu eĉ pli ora!

\*Bonvolu sendi viajn ideojn kaj proponojn pri programeroj al: Henry STUDER, 908 Villanova Dr, Davis CA 95616; [hestuder@ucdavis.edu](mailto:hestuder@ucdavis.edu).

## Catastrophe Inspires World Solidarity

"But [...] close to [ground zero], it looks like a scene from war. Constantly fearing the next attack, people are digging through the rubble of their houses, looking for — what? Valuables? Family photos? The family itself?"

The September 11 catastrophe in New York, Washington DC and Pennsylvania very much reminded me of the one I lived through six years ago in Japan. The above quote is a translation of an article I wrote at the time, describing scenes from Kobe after the Great Hanshin Earthquake in January of 1995. I lived only 40 miles from the earthquake's fault line, the center of the quake. Fortunately, there was only minor damage in my town, Kameoka, but we certainly felt the tremors, both of the earth itself and of the fear that they instilled. The death toll for the earthquake one week afterwards was over 5000; a year later it had climbed to over 6000. It seems to be about the same magnitude as September 11's catastrophe.

What brought home the similarity, though, was the aftermath. Within a few hours, we began receiving the first of many messages from around the world, offering condolences and solidarity. Some, including one from Uzbekistan, said, "If there is anything we can do to help, please let us know."

These messages come from Esperantists around the world. Many are written by the president or other representative of a national, local, or international Esperanto organization, but others are from individuals with no particular authority to represent others. In 1995, they came mostly by fax but also by various other means; in 2001 almost exclusively by email.

I wish the whole nation could read these letters. They are very touching and encouraging. In a time of great sorrow, it helps to be reminded that many people all around the world really do care. ELNA received over 50 such messages from about 40 countries and international organizations from every populated continent, including such places as Croatia, Bosnia and Hercegovina, Yugoslavia, Bulgaria, Romania, Russia, Ukraine, Lithuania, Armenia and many other countries in Europe, Israel, Iran, Pakistan, Uzbekistan, China, Korea, Japan, Australia, Togo and the African commission of UEA, Cuba, Colombia, Venezuela, Argentina, Mexico, Canada, the European Esperanto Union and other Esperanto organizations around the world.

Many thanks to all who expressed their support.

Joel B.

Ferencz MÓZSI

### MALESTAS

malestas justaj militoj  
maljustaj vivoj

senĉese l' Tero sangas

dolor' ne havas naciecon  
tristeco religion  
ofendoj estas naciaj

sed niaj vundoj  
estas malhomaj vundoj  
kuraceblaj  
sed neniam resaniĝantaj

nigraj blankaj flavaj  
unuforme ploras  
sed historio senlarmas

El la hungara tradukis Ionel ONET

# Literatura 2001 odiseado

Literatura suplemento al esperanto USA 5/2001

Howard HAMMOND (n. 1956)

## D-RO KASANDRO

La maljuna barbulo, portanta blankan vestaĵon, sidiĝis ĉe tablo kaj ŝaltis lampon. Malrapide, zorge, li prenis notlibron kaj plumon el la poŝo. Flegistino alportis glason da akvo kaj metis ĝin apud la paperon. La maljunulo malatentis tion, ferminte la okulojn kaj preĝante. Poste li enmanigis la plumon kaj ekskribis.

“Kiu estas tiu maljunulo?” demandis nova flegisto.

“Ho, tiu estas D-ro Kasandro,” respondis la sperta flegistino. “Kvankam doktoro, li mem estas paciento ĉi tie. Kompatinda tragikulo... Ŝajnas, ke li estis doktoro en ĉi tiu malsanulejo. Li penis kuraci iun knabinon, sed ordonis la malĝustan medikamenton kaj senintence mortigis ŝin. Lia menso ne povis akcepti ŝian morton kaj li freneziĝis.”

“Kion li skribas?”

“Nenion. Li nur desegnas cirklojn.”

Sed la cirkloj ja havas signifon. Ni atendu pacience kaj rigardu super la ŝultro de la kompatinda doktoro. Jen la cirkloj, sed ni rigardu pli zorge... Kvazaŭ tra prismo, tra kristalo, ni alĝustigu specialajn okulvitrojn kaj iom post iom komprenu tion, kion skribas la kompatinda D-ro Kasandro...

... Mi vidas vin ĉi tie, Tina. Ho, Tina, kiom da fojoj mi petis vian pardonon! Kaj mi daŭre petas kaj eterne petos vian pardonon. Kial vi restas kun mi, Tina? Ĉu por turmenti min? Ŝajnas, ke ne. Vi scias, ke mi mem pli bone ol iu ajn scipovas turmenti min. Male, ŝajnas, ke vi restas kun mi kvazaŭ por konsoli min, por helpi min. Vi neniam parolas, sed ĉiam ridetas. Kiel bele vi aspektas, kiam vi ridetas, Tina!... Vi scias, Tina, ke mi dankas al Dio pro tio, ke vi restis kun mi. Alie, mi sentus min tiel sola. Nun, mi povas paroli kun vi, kvankam vi neniam respondos...

Vi scias, Tina, ke oni diras, ke mi estas frenezulo. Eble oni pravas. Vi ridetas al mi. La frenezeco ne gravas al vi. Nu, kio gravas al vi? Ĉu ne viaj ge-

patroj? Kial vi ne restas kun ili? Aŭ eble mi bezonas vian helpon pli ol ili? Mia familio mem mankas al mi. Ĝi gravas al mi. Sed ĝi ne havu tian monstron, mortigan doktoron kiel patron... kiel edzon... Do, mi liberigis ĝin kaj senliberigis min... Vi ridetas... Vi komprenas ĉion, knabino... Pli bone ol maljuna doktoro... Vi estas kuracisto por doktoro... Almenaŭ por eks-doktoro...

Ĉu eble vi povos kuraci miajn vidaĵojn, Tina? Ekde mia freneziĝo, mi daŭre antaŭvidas ĉion. Nun vi ridas... Nu, vi pravas. Se vi kuracus miajn vidaĵojn, mi ne plu vidus vin! Kaj viaj vizitoj ja plaĉegas al mi! Tamen, miaj vidaĵoj estas foje teruraj, kaj mi ne povas regi ilin. Jen mi antaŭvidas la flegistinon, alportantan glason da akvo; jen mi antaŭvidas tertremegojn kaj la malsanulejon detruotan. Ili ne estas halucinoj, ĉar laŭ la scio de frenezulo ili ja realiĝas... Kaj vi, Tina, vi ne estas halucino... Do, mi ne estas tiel freneza... Kaj se mi avertus aliajn pri miaj teruraj vidaĵoj?... Ĉu iu kredus la vortojn de frenezulo?

Nu, Tina, kion ni faru por amuzi nin? Estas malfacile ludi kartojn skribante. Kial mi skribas? Por klarigi miajn pensojn, kiel mi povas. Plue, mi iam kredas, ke se mi ĉesus skribi, vi ĉesus viziti min. Vi ridetas ankoraŭ... Sed... Kion? Tiun muron? Vi montras la muron... kaj vi alvokas min tien... Vi volas, ke mi sekvu vin tien? Sed vi trairas ĝin kaj mi ne estas fantoma! Ho, Tina! La muro ekbriliĝis... Jes, mi esta preta... Mi kuniros kun vi, karulineto...

“Atentu! D-ro Kasandro, ŝajne, ekmortis! Geflegistoj! Helpu min revivigi lin...” Sed estas vane, ĉar D-ro Kasandro ne plu estas en la ĉambro. Li jam estas pasinta tra la muro, kun sia gvidantineto... Ĉiukaze, morgaŭ komenciĝos la tertremegoj...

Albert GOODHEIR (1912-1995)

### STONE MARKINGS FROM THE BRONZE AGE

Leaves colored the mountains.  
I hiked beneath migrant clouds  
through a pathless heath.  
Pushing through scrub-brush  
I stumbled upon a naked stone,  
a rough rock which is covered  
by handmade symbol-markings:  
little hollow basins surrounded  
by four or five concentric circles.

Three thousand years ago a hand,  
wondering at the migration of clouds  
and seeking the unchangeable,  
made a mark of immortality,  
carved a code: spheres of light,  
water-rings of a stone-throw,  
ideally mirror the limitless.

You are wise, bronze-age brother.  
You know: great glory crumples;  
time erodes the bronze sword;  
helmets rust with the bones;  
battlecries fly away with the wind;  
tribal pride will die with defeat.

A cleansed door of perception  
shows signs of immortality:  
the shine of eyes, hair;  
forest colors in the mountains;  
the serpentine winding of a river;  
the migrant markings of a tale,  
which I read gradually  
(which reads me and includes  
both of us with trees, clouds?).  
By hand more than by brain you conceived  
your speech beyond thought:  
passing through limits of time  
you are here in your carved signs.

*Translated from Esperanto by Miko SLOPER*

Anna BENNETT (n. 1950):

**P**or kio mi laboras...  
**O**feras miajn sperton kaj talenton?  
**R**evas mi – kaj ankaŭ agas.  
**P**aco ja estas la celo!  
**A**nstataŭ revii sen espero,  
**C**erte eĉ unu solulo  
**O**fte povas helpi aliulon.

Tristan TZARA (1896-1963)

### FRIDO FLAVA

ni iras nuboj inter eskimoj  
plibeligi la konvaleskon de niaj pensoj botanikaj  
sub krepuskoj torditaj  
rubo verdiĝinta vibranta  
blanka

mi ordigis miajn promesojn sukeraĵejo hotelisto en sia butikoj  
paŭlovnioj definitivaj  
la malproksimigo disvolviĝas glacie kaj akre kvazaŭ diliĝenco  
malproksimigo pluvoza  
adoleskanto  
aliloke sonora

pasanto febra kaj putra kaj  
rompita kaj brodaĵoj ripareblaj  
mi pensis pri io tre ĝena  
aŭtuna kalendaro en ĉiu arbo  
mia am-organo estas blua  
mi estas mortiva sinjoro blu-blu'

kaj el la kadavro lando stranga altiĝas  
altiĝas altiĝas al aliaj astronomioj

*El la franca tradukis Ionel ONEȚ*

Walt WHITMAN (1819-1892)

### KANTO DE LA LIBERA VOJO — fragmento —

Gaje paŝante, mi ekiras la liberan vojon,  
Sana, senmalhelpa, kun la mondo antaŭ mi,  
Kun la longa, bruna irejo antaŭ mi, kondukanta kien ajn mi elektas.  
De nun mi ne petos feliĉon, mi mem estas feliĉo,  
De nun mi ne plu ploreto, ne plu prokrastos, bezonos nenion,  
Forkonfesinte endomajn plendojn, librarojn, ĉikanajn kritikojn,  
Forta kaj kontenta, mi vojaĝas laŭ la libera vojo.

*Tradukis el la angla Maurice J. WITTENBERG*

### DEKLARO

**A**mikecon kaj bonvolon ni kunhavas.  
**G**asti kaj gastigi: per tio  
**A**mikojn ni malkovras  
**S**en limoj de lingvo aŭ lando.  
**M**i? Sole? Eble ne –  
**I**ndividue sukcesas ni... kune!



## LA SIMIETINO



“Sed se homo volas esti sola,  
tiu rigardu la stelojn. ...  
Se la steloj aperus unu  
nokton el mil jaroj, kiom la  
homoj kredus kaj adorus ...”  
(Ralph Waldo Emerson,  
*Naturo*, ĉap. 1)

“Mi ripozas ĉi-nokte  
en la Templo de l’ Supraĵo.  
Mi povus pluki la stelojn.  
Mi ne riskas en la silento  
laŭtparoli,  
timante ĝeni  
la ĉielloĝantojn.”  
(Li Po, *La templo de l’ supraĵo*,  
Esperantigis William Auld)

Ŝi naskiĝis sur la senfina stepo, sub la monda arbo.

Mi ne scias, kie aŭ kiam tio okazis; ankaŭ tion ne scias la homo, kiu rakontis al mi ĉi tiun historieton. Tiu diris al mi, ke sur la stepo troviĝis ankaŭ gigantoj kaj drakoj, kaj ĉe la horizonto oni povis vidi, sub la plena luno, frostan bluan glimadon. Sed ĉu temis pri Afriko aŭ Azio aŭ iu en nia tempo tute ne konata kontinento, mi ne scias; la drakoj povis esti la lastaj dinosaŭroj, aŭ eble posteuloj de la gen-inĝenieritaj flugbestoj de la estontaj jarcentoj; simile, la gigantoj povis esti gigantopitekoj el la neimagebla pasinteco de la homaro, aŭ eble la pranejoj de la megasolduloj kiuj batalos en la finaj mondmilitoj; kaj glaciepokoj okazis en la fora pasinteco kaj verŝajne okazos ankaŭ en la fora estonteco.

Eĉ la arbo ne donas indikon. Ĝi povas esti unu el la supersalikoj, kiujn postlasos la malaperonta homaro; aŭ ĝi povas esti tiu jam formalaperinta monda arbo, kiun la skandinavoj ankoraŭ memoras sub la nomo Yggdrasil kaj la ĉinoj – kiel Jianmu.

Ŝi estis simietino kaj ŝia popolo, la simietoj, estis la popolo de la monda arbo, regantoj de la ĉirkaŭanta stepo. Ili ne estis malinteligenta popolo; ili vidis la universon ne tute malsame ol ni, kaj ankaŭ tio povas indiki aŭ pasintan aŭ estontan epokon. Nu, kiel mi diris, ili estis arbo-popolo. La infanoj naskiĝis sur la grundo de la stepo kaj je tre frua aĝo devis komenci grimpi sur la arbo kaj neniam plu reveni al la tero ĝis la morto. Kaj se vi tuj vidus la evidentan absurdaĵon, nu, mi simple diru, ke la simietan popolon ne ĉiam regis tio, kion ni ŝatas nomi “logiko”.

Por ŝi, tamen, io pli ol la subkonscia rasa pelo logis

ŝin al grimpado en la arbo. Kvankam la arbo staris nemezureble alta kaj nemezureble vasta, ĝi tamen foje lasis, ke vido de la ĉielo trapasu ĝian foliaron. Ŝi ne trovis aparte interesa la tagajn vidaĵojn de sunaj ekbriloj aŭ ĉielbluaj flikaĵoj; sed kiam la nokto falis kaj aparte kiam la luno, tiu granda kaj pala vizaĝo kiun adoris la aliaj simietoj, ne estis sur la ĉielo, ŝi foje povis vidi la subitan ekbrilon de tiu aŭ tiu stelo. Kaj ŝi miris kaj scivolis: pri kio temas? Kaj iel eniris ŝian kapon, ke se ŝi sufiĉe grimpos sur la monda arbo, ŝi povos atingi tiujn etajn ekbrilojn kaj kompreni, kio ili estas, de kie ili venis kaj kien ili iros.

Do, celante la stelojn ŝi ekgrimpi sur la monda arbo.

